Esperanto
V-14621/87
(1990)

EK



5/1990

REVUO
FONDITA
EN JARO 1903

OFICIALA ORGANO
DE I.K.U.E.
INTERNACIA
KATOLIKA UNUIĜO
ESPERANTISTA

espero katolika

JARKOLEKTO 87 - N. 826
MAJO 1990

Sur la kovrilo: la panelo kun la Esperantlingva teksto " Benata " en Ain Karim (Sankta Lando)

Karaj Legantoj,

ĉi-foje ni povas ĝoji, ke nia revuo aperas (fine!) akurate je la ĝusta momento. Kredu nin, ke ni estas eĉ pli feliĉaj ol vi pri ĉi tiu atingo.

Ni esperas, ke ankaŭ niaj membroj (respektive, legantoj) estos akurataj. Ĝenerale, nur ĉe la fino de la jaro ni sukcesas havi precizan ideon pri kiu pagis kaj kiu ne; tio kaŭzas multe da ekstra laboro kaj precipe multe da nenecesaj elspezoj.

En ĉi tiu numero, meritas apartan atenton la informoj en la rubriko " Movade "; serĉu ilin tuj, kaj bonan legadon!

La Redakcio

Periodico culturale mensile - Gruppo III pubbl. inf. 70% - Gratis ai soci
Monata kultura gazeto

I. K. U. E.

INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA

Honora Prezidanto:
Sac. Alfons Beckers
Rozenlaan, 5
B - 3950 Beringen (Belgio)

Prezidanto:
Sac. Duilio Magnani
viale C. Zavagli, 73
I - 47037 Rimini/Forlì, Italio

Unua Vicprezidanto: Sac. Lajos Kòbor,
H-9484 Pereszteg, Hungario

Dua Vicprezidanto: Sac Franjo Gruiĉ, Strossmayerov trg 5, YU-54400 Djakovo, Jugoslavio

Sekretario-Kasisto:
Antonio De Salvo

Estraro:
A. Beckers, A. Casey, A. Ciccanti, R. Degrelle, A. De Salvo, R. Forycki, F. Gruiĉ, L. Kòbor, J. Kondor, J. Korytkowski, B. Pochanke, R. Ruaro, S. Szénàsi

Plenumkomitato:
Aŭstrio: Mudrak; *Belgio:* Poterucha; *Ĉeĥoslovakio:* Dlugi, Ŝvaĉek; *Francio:* Bourdon; *F.R. Germanio:* Eichkorn; *Hispanio:* Casanoves; *Hungario:* Kaszab; *Italio:* Cadei; *Jugoslavio:* vakas; *Nederlando:* Smits; *Pollando:* Kos; *Svislando:* Bommer; *Usono:* Laughery

Centra Oficejo:
Via Berni, 9
I - 00185 Roma (Italio)
tel. (06) 75.88.388
poŝta konto 23290000
Direktoro: Antonio De Salvo

Oficiala organo:
Espero Katolika

Kotizo: 30 svisaj frankoj aŭ egalvaloro

Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo
(Registrazione presso il Tribunale di Roma)
n. 17138, 11-2-1978

Respondeca Direktoro (Direttore Responsabile):
Antonio De Salvo
C.P. 4017 Appio, I-00100 Roma RM, Italio
tel. (06) 78.10.782 (vespere)

Redaktoraro: Sac. Battista Cadei, Antonio De Salvo

Presejo (Tipografia):
ROTATORI
Viale Manzoni, 22/b - Roma

MI VOKAS VIN, HO ETERNULO, KAJ VI AŬSKULTAS MIN!

Medito al psalmo 91

1 - Kiu loĝas sub la ŝirmo de la Plejaltulo,
Tiu ripozas en la ombro de la Plejpotenculo.
2 - Mi diras al la Eternulo: Mia rifuĝejo kaj mia fortikaĵo
Estas Dio, kiun mi fidas.
3 - Ĉar Li savos vin de la reto de kaptisto;
De la pereiga pesto.
4 - Per Siaj plumoj Li ŝirmos vin,
Kaj sub Liaj flugiloj vi rifuĝos;
Lia fideleco estas ŝildo kaj kiraso.
5 - Ne timu la teruron de nokto,
Nek sagon, kiu flugas tage,
6 - Nek peston, kiu iras en mallumo,
Nek epidemion, kiu ekstermas tagmeze.
7 - Ĉe via flanko falos milo,
Kaj dek miloj ĉe via dekstra flanko;
Sed vin ĝi ne tuŝos.
8 - Vi nur rigardos per viaj okuloj,
Kaj vi vidos la redonon al la malvirtuloj.
9 - Ĉar Vi, ho Eternulo, estas mia defendo!
La Plejaltulon vi elektis kiel vian rifuĝejon.
10 - Ne trafos vin malbono,
Kaj frapo ne atingos vian tendon.
11 - Ĉar al Siaj anĝeloj Li ordonis pri vi,
Ke ili vin gardu sur ĉiuj viaj vojoj.
12 - Sur la manoj ili vin portos,
Por ke vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo.
13 - Sur leonon kaj aspidon vi paŝos,
Vi piedpremos leonidon kaj drakon.
14 - Ĉar li ekamis Min, tial Mi lin savos;
Mi defendos lin, ĉar li konas Mian nomon.
15 - Li vokos Min, kaj Mi lin aŭskultos;
Mi estos kun li en mizero;
Mi lin liberigos kaj honoratigos.
16 - Mi satigos lin per longa vivo,
Kaj aperigos al li Mian helpon.

Ĉiu el ni konas la neelireblan cirklon, la diablan cirklon, el kiu iu ajn homo ne kapablas forsavi sin mem. En la 91-a psalmo ni spertas la kontraŭan aferon, ni renkontas, laŭ mia opinio, gracan cirklon, dian cirklon, kiu donacas savon.

La preĝanto scias sin mem ŝirmata de Dio, la Plejpotenculo, kaj li instigas aliajn piulojn: " *Fidu la Eternulon! Loĝiĝu en Lia ŝirmo! Mi mem spertis kaj spertas Lian helpon. Pro tio mi preĝas al Li: 'Mia rifuĝejo kaj mia fortikaĵo!'* ".

Kaj la Eternulo respondas je la fino de la psalmo al la alparolado de psalmisto: " *Ĉar li ekamis Min, tial Mi lin savos!* ".

La preĝanto alvokas amante kaj fidante Dion, ĉar li spertis kaj spertas Lian helpon, Lian gracon, Lian ŝirmon, kaj Dio helpas, respondas amante kaj savante, ĉar Li scias ke la preĝanto fidas, konfidas Lin.

La homo povas preĝi fid-plene, ĉar Dio amo-plene rigardas lin, kaj inverse: Dio amo-plene rigardas lin, ĉar li fid-plene preĝas.

La psalmisto scias, ke ĉiaj danĝeroj, venante el la naturo, de malamikaj homoj, de malamikaj bestoj, povas trafi lin. Sed malgraŭe li scias sin mem ŝirmata en la amo de la Plejpotenculo. La apostolo Paŭlo esprimas ĉi tiun sperton en la letero al Romanoj tielmaniere: " *Ni scias, ke por tiuj, kiuj estas vokitaj laŭ Lia intenco, ĉio kunlaboras al bono!* " (Rom 2,28). Kion ni timu? " *Se Dio estas por ni, kiu estas kontraŭ ni?* " (Rom 8,28). Ĉi tie, je la fino de 8-a ĉapitro de la letero al Romanoj ni trovas la novtestamentan nombradon de danĝeroj, kiu minacas. Sed ĉiuj ne povas apartigi nin de la amo, kiun donacas Dio al ni en Jesuo Kristo.

Laŭ la atesto de la evangelio laŭ Mateo la diablo, la tentanto, citas ĉi tiun psalmon provokante Jesuon ĵeti sin mem de la tegmenta pinto de templo (Mat 4, 5-6). Tio signifas, ke la juna Eklezio, ke eĉ Jesuo mem bone konas ĉi tiun psalmon. Preĝante la 91-an psalmon ni uzas la preĝ-libron, la preĝon de Jesuo kaj kune kun Li ni metas nin en la ŝirmon de la Ciela Patro.

Fratino Theotima Rotthaus
Kloster Wald, D-7794 Wald, F.R. Germanio

IOM PRI "SALUTON MARIA"

La preĝo "*Saluton Maria*" estas kunmeto enhavanta laŭdojn, salutojn kaj petojn al nia Plej Sankta Patrino. Ĉi tiu preĝo estas dividita en tri partojn. Unuavide ŝajnas, ke ĝi estas dividita en du partojn, sed ĝustadire ĝi enhavas tri partojn. La unua kaj dua parto enhavas bibliajn vortojn kaj la tria estis kreita de la katolika Eklezio.

Unua parto

Ĉe la unua parto ni preĝas: *Saluton Maria gracoplena. La Sinjoro estas kun Vi.* Ĉi tiuj vortoj apartenas al la Evangelio (Luk 1,28) kaj estas salutvortoj de anĝelo Gabrielo antaŭ ol anonci al Maria, ke ŝi fariĝos la Patrino de Jesuo. La iamaj vortoj de la anĝelo, kiuj fariĝis niaj nunaj vortoj, signifas:

Mi vin salutas, Maria. Mi vin salutas ĉar vi estas gracoplena. Kaj kial gracoplena? Ĉar la Sinjoro estas kun vi. Ĝuste pro tio, Maria estas benata inter la virinoj. Tiu saluto elmontras kiel digna kaj sublima estas Maria, la patrino de Jesuo.

Beato Angelico, Anonco al Maria
(Florenco, Italio, Muzeo S. Marko)

Vizito de Maria al Elizabeta

Dua parto

Ĉe la dua parto, ni preĝas laŭdojn de Sankta Elizabeta al nia Sankta Patrino pere de ĉi tiuj vortoj: *Benata vi estas inter la virinoj, kaj benata estas la frukto de via sino, Jesuo.* Ĉi tiuj vortoj estas ankaŭ Evangeliaj (Luk 1,42). Kiam nia Sankta Virgulino estis graveda de tri monatoj, ŝi vizitis sian parencinon Elizabeta, kiu gravediĝis je filo en sia maljuneco, kaj sin trovis en la sesa monato je gravediĝo (Luk 1,36).

La naskiĝonta infaneto de Elizabeta, Johano la Baptisto, eksalits en ŝia ventro (Luk 1,41). Eksaltis de ĝojo, de feliĉo, pro la vizito de Jesuo, kaj Elizabeta salutas Marian pere de tiuj vortoj, kiuj signifas, ke Maria estas la plej feliĉa inter ĉiuj virinoj, ĉar Jesuo estas la plej benata inter ĉiuj estuloj.

Tria parto

Ĉe la tria parto, kreita de la katolika Eklezio, ni preĝas jene: *Sankta Maria, Patrino de Dio.* Ĉi tie ni asertas, laŭ katolika principo, ke Jesuo estas Dio, kaj ke Maria estas lia Patrino, tial ŝi estas Sankta. *Preĝu por ni pekuloj*: ni kredas je la propetoj de Maria ĉe la Eternulo, ĉar ŝi estas nia advokatino. *Nun*: tio signifas: nuntempe, kiam ni vivas kaj necesbezonas ŝian helpon, sed ankaŭ: *En la horo de nia morto*: kiam ni aperos antaŭ Dio.

Konkludo

Ni fidas kaj kredas je la propetoj de Nia Sinjorino, tial ni apelacias al Maria. Kiam ni preĝas "*Saluton Maria*" ni salutas nian Plej Sanktan Patrinon per la samaj anĝelaj vortoj, per la samaj vortoj de Sankta Elizabeta, kaj finfine ni submetas niajn vivojn je ŝiaj propetoj.

Amen!

Antonio Luis Lourenço dos Santos, Brazilo

INTERVJUO AL ĈINA PASTRO

Okaze de mia aliro por E-instruado en urbo Fuzhou, en Jiangxi-provinco, mi vizitis tiean preĝejon. En la dua tago post mia alveno al la urbo, mi sole serĉis la preĝejon; enirinte, mi demandis la pordiston: " Pardonon, ĉu pastro restas hajme? " - " Jes, hejme, en la ĉambro de unua etaĝo ", li respondis. Mi supreniris laŭ ŝtuparo.

Post ' saluton ' unu al la alia, mi prezentis mi mem katoliko,kaj ke laŭ invito mi venis el Ŝanhajo por instruadi Esperanton en kurso. La pastro mienis kun admiro. Ni faris konversacion jene:

ŜANHAJANO - *Ĉu via moŝto fartas bone?*

PASTRO - Ne troe, mi suferas de alta sangpremo k.a. Pasintjare mia stato estis danĝera.

Ŝ - *Kiom da fideluloj ĉi tie?*

P - Pasintece kvar mil, nuntempe nur milo. La kialo estas simpla: ĉie estas tia la situacio post la granda kultura revolucio.

Ŝ - *Prave, ĉie nun malpli multe ol antaŭe. Ĉu vi estas ĉi tie unu sola pastro?*

Ĵ - Jes. Mi do estas tre okupita, ĉar en kelkaj vilaĝoj estas pli da fideluloj, kaj tien mi devas iri celebri meson kaj konfespreni.

Ŝ - *Ĉu taŭge al vi, se neniu helpas?*

Ĵ - Ho, ĵus efektiviĝis la nova politiko pri religio, kaj iuj bazaj kadroj ankoraŭ ne konis tian ' politikon '. Kiam pastro ien iris, oni lin malpermesis mescelebri, oni perforte demetigis liajn mesvestaĵojn kaj eĉ lin batis. Nun tamen mi, elektite kiel vicprezidanto de la Urba Politika Konsiliĝa Konferenco kaj ĉefo de Urba Katolika Patriota Asocio, antaŭ ol aliri vilaĝon, ĉiufoje sendas oficialan dokumenton al la baza organizo;



La intervjuinto

La *kontraŭulino* de la pastro

tial mi ne nur gajnas ilian protekton sed ankaŭ bonan akcepton kaj bongustan manĝon.

Ŝ - *Bona maniero!*

P - Patriota Asocio estas uzebla.

Ŝ - *Ne 'mi' por ĝi, sed ĝi por mi.*

P - Prave, via koncepto samas kiel la mia.

Ŝ - *Ĉu iu fratino estas via helpanto?*

P - Estis iu kun blanka fluga ĉapo, sed nun ŝi min kontraŭs.

Ŝ - (Mi konsciiĝas ke ĉi-vorto enhavas 'problemon', kaj ĉi-teme ne demandas pluen). *Ĉu vi sendis junulojn al la Ŝanhaja seminario?*

P - El 12 senditoj, revenis 10.

Ŝ - *Tio estas tre peza ŝarĝo por vi!*

P - Jes, poe 1300 juanoj jare por la seminario.

Ŝ - *Ĉu la enspezoj sufiĉas al vi ĉiujare?*

P - Vole ne-vole, nur per interezo de bankdeponaĵo.

Ŝ - *Bonege! De kie venis la deponaĵo?*

P - El ŝparoj dum la preĝejo-rekonstruo.

En la preĝejo de la Senmakula en Pekino, dum la Kristnaska nokto 1989, estis ordinitaj 6 pastroj de la " Patriota Eklezio "

Demandinte kie loĝas la helpantino (kontraŭulino de l'pastro), mi vizitis ŝin kaj interparolis post reciproka saluto:

Ŝ - *Hieraŭ mi vizitis la pastron. Jen lia nomkarto.*

H - Ho, estas li.

Ŝ - *Dimanĉe mi ne vidis vin en la preĝejo dum la meso.*

H - Hi hi hi, li estas nutrata de la registaro.

Mi komprenas la kaŝitan signifon de la vorto ' nutrata '. Efektive mi aŭdis ke ŝi, 82-jara, kun multaj parencidoj ĉiusabate vespere kunpreĝas en la halo de ies domo. Komence estis pli da fideluloj ol en preĝejo. Inter ili estis iuj nesamaj familinomoj, kiuj poste estis nepermesitaj. Juj preĝas nek en la halo nek en la preĝejo. Interese estas, ke iu mastrino de bakejo konfesis sin samkredanino, sed poste ŝi respondis ke ŝi ne konatiĝis kun samloka pastro. Mi pli profunde informpetis, kaj mi eksciis, ke iam du pastroj, ĵus liberigitaj, ĉeestis en ilia kunpreĝado, kiun oni nomas ' subtera eklezio ', kaj pro tio denove enprizoniĝis.

Peterson, Ŝanhajo, Ĉinio

MALLUMA JARCENTO (jaroj 900 - 999)

La imperio de Karolo la Granda (742-814), kiu unuigis la okcidentan Eŭropon, baldaŭ disdividiĝis en diversajn regnojn, kiuj siavice disfragmentiĝis en multege da feŭdoj tre ofte reciproke konfliktaj, en etoso de korupto kaj perforto.

En la 10-a jarcento la germana reĝo Otono (912-975) entreprenis reunuigon de Eŭropo, kaj en 962 li ricevis de papo Johano la 12-a la imperiestran kronon. En sia klopodo regi la grandajn feŭdestrojn, kaj kontraŭbatali korupton en la administrado, li decidis konfidi la feŭdojn al episkopoj, des pli ke ĉi-lastaj, estante fraŭlaj, ne povis heredigi la feŭdojn, kiuj, ĉe la morto de la episkopoj-grafoj, revenis sub la aŭtoritaton de la imperiestro. Tio plibonigis la administradon de la imperio, sed pliaĉigis la moralan nivelon de la eklezio, ĉar la episkopoj estis elektataj ne surbaze de religiaj ecoj, sed de politikaj konsideroj.

En Romo, la enmiksiĝoj de la imperiestroj kaj de la lokaj nobeloj en la eklezian vivon kaŭzis gravajn malordojn: papoj eĉ tute junaj, aŭ malmoralaj, perfortaj... estis elektitaj, eksigitaj, foje eĉ murditaj laŭ la kaprico aŭ la sorto de la interbatalantaj nobelaj familioj de Romo. Temas pri la « fera » aŭ « malluma » jarcento, en kiu « uloj de la eklezio » kondutis ege malbone. Tiu epoko estas malbone konata: ĝi estas « malluma » ankaŭ ĉi-sence.

Ekzemple, estiĝis onidiro, ke en tiu jarcento virino fariĝis papo; sed ke la historio de « papino Johana » estas legendo pruvis jam en la jaro 1649 la nederlanda kalvinano Davis Blondel.

Malgraŭ la pekoj de multe el ties altranguloj, la eklezio ne ĉesis administri la sakramentojn, anonci la Dian parolon, evangelizi aŭ pluevangelizi la orientan kaj nordan Eŭropon.

HUNGARIO. La evangelizado de la Hungaroj okazis ekde 971, fare unue de germanaj kaj poste de slavaj predikantoj. Gravan rolon en la kristanigo de Hungario havos reĝo Stefano la 1-a (969-1038).

BOHEMIO. Ekde 925 duko Venceslao favoris la predikadon en la lando, sed en 929 lin perfide murdis lia frato Boleslao. En Bohemio la kristanismo disvastiĝis malrapide, sed konstante.

POLLANDO. Kiam bohema princidino edziniĝis al la pola duko Mjeĉislao, ĉi-lasta baptiĝis (966) kaj komencis la kristanigon de sia popolo, kiu je la fino de la jarcento jam estis grandparte kristana.

DANLANDO. Intensa kristanigo de la Danoj okazis ekde 934. Antaŭ tiu jaro la kristanoj estis malmultaj.

NORVEGIO. La kristanigo de la Norvegoj, komencita sen rimarkindaj fruktoj sub reĝo Hakono (938-961), plimulte sukcesis sub reĝo Olafo Trigvasono (995-1000).

BRITIO. Pludaŭris la konvertiĝo de la alvenintaj Normanoj.

IRLANDO. Kreskis la nombro de la konvertitaj Normanoj. La Vikingoj restis paganaj.

ISLANDO. La evangelion tie predikis la saksa pastro Frideriko ekde 981 ĝis 985, kiam li estis forpelita. Fine de la jarcento la evangelizado revigliĝis dank' al perado de la norvega reĝo Trigvasono.

GRENLANDO. Reĝo Trigvasono akcelis la kristanigon ankaŭ de tiu insulego, kie formiĝis kristana komunumo gvidata de la norvega episkopo Arnoldo.

RUSIO. La princo de Kiev, Vladimiro, komencis la kristanigon de sia popolo per la helpo de misiistoj bulgaraj, moravaj, latinaj kaj grekaj. La 988 estas rigardata kiel jaro de bapto de la kieva Rusio.

La malalta nivelo de la papoj, kaj tio ke la papeco ligiĝis kun la germana imperio, ignorante la orientan, igis ke la latina (okcidenta) eklezio izoliĝis disde la greka. La du eklezioj ankoraŭ estis en kunuleco, sed la frataj interrilatoj estis nek oftaj nek elkoraj.

Aliflanke en multaj orientaj regionoj la islamismo pluvastiĝis tiel ke la kristanoj reduktiĝis al negrandaj komunumoj meze de islamanaj majoritatoj (Armenio, Kaŭkazo, Mezopotamio, Persio, ...).

Dokumento: Martiriĝo de duko Venceslao (praslava rakonto)

Venceslaon (907-935), apostolon de la Bohemoj, murdis lia pli juna frato Boleslao:

Venceslao bonfaris al ĉiuj malriĉuloj, vestis nudulojn, malsatulojn nutris, pasloĝantojn gastigis, laŭ la evangelia parolo. Li ne toleris maljustaĵojn kontraŭ vidvinoj, kaj li amis ĉiujn homojn, riĉajn kaj malajn... Sed bohemaj viroj orgojliĝis kaj persvadis lian pli junan fraton, dirante: « Via frato Venceslao vin mortigos, konspiracie kun la patrino kaj kun siaj anoj » ... *Venceslao rigardis lin kaj diris:* « Frato, hieraŭ vi estis al mi bona servanto ». *Tiam la diablo kliniĝis al la oreloj de Boleslao kaj misgvidis lian koron; kaj, elinginte la glavon, li respondis:* « Nun mi volas esti eĉ pli bona al vi ». *Tion dirinte, li vundis lian kapon per glavo.*

Tiam Venceslao, sin turninte al li, diris: « Kion vi havas en via koro, frato? ». *Kaj li kaptis lin kaj faligis lin. Tiam alkuris unu el la konsilistoj de Boleslao kaj batis la manon de Venceslao. Ĉi-lasta, vundita je mano, lasis la fraton kaj rifuĝis en la preĝejon. Tiam du malbonfaruloj vundis lin ĉe la preĝejo-pordo. Alia alkuris kaj glave trapikis lian flankon. Tiam Venceslao tuj eligis la animon kun jenaj vortoj:* « En viajn manojn, Sinjoro, mi transdonas mian spiriton ».

RELIGIOJ EN LITOVIO

Ĉe la fino de 1989 en Litovio estis 796 religiaj komunumoj; 657 katolikaj, 41 ortodoksaj, 27 luteranaj, 7 reformitaj, 5 baptistaj, 3 islamanaj, 2 judaj, 2 pentokostanaj, 1 karisma.

Pasintjare al la kredantoj estis redonitaj 20 katolikaj preĝejoj kaj unu ortodoksa. Krome oni liveris permesojn por rekonstrui aŭ novkonstrui 15 preĝejojn. Plivastigata estas la porpastra seminario en Kaŭno (Kovno) kaj refunkciis tiu en Telĝo en Zamlando.

La litova televido ĉiusemajne emisias apartan religian programon, dum Pasko kaj Kristnasko aldone Sankta Meso celebrata en la litova aperas en la televida ekrano.

La eldonkvanto de la ĵurnalo " Katolika Mondo " estas cent mil.

Do, ni ĝojdanku Dion pro la pliboniĝo de la religia vivo en Litovio.

Andreo Marszalkowski, Pollando

PAX VOBIS!

" *Paco estu jen al vi!* "
estis de l'Savint' unua vorto
post la reviviĝ' el tomb' kaj morto.
Kristo ankaŭ nun ĉi-vorton diras,
kvankam paco-malproksime iras
homa gento, for de Di'.

Kiom riĉa estas do kristano:
pacon, " kiun mond' ne doni povas ",
li (ŝi) en sia kor' per Kristo trovas
ankaŭ dum batal' kaj uragano;
kaj la paska ben' evangelia
etendiĝas tra la regno Dia.

Tial helpu ni per preĝo, faro,
ke retrovu Kriston la homaro!
Tiel kresku celkonscia kontraŭstaro
al armadkonkuro kaj militpreparo!

Walter Mudrak, Aŭstrio

SE

Se povas vi pensadi kiam ĉiuj
ekfreneziĝas kvazaŭ kulpa vi;
se vin mem fidi, ĉie malfidate,
sed kun toler' pri ĉies opini';
se povas vi senlace atendadi,
primensogate ne mensogas mem,
aŭ malamate, restas vi amanta,
sen tro da bonaspekt' aŭ saĝdirem';
se revi povas vi - ne tamen sklave;
se pensi - kaj pensaĵojn meti for;
se povas Malsukceson kaj Triumfon -
trompulojn - same trakti via kor';
se lasas vi friponoj aŭ simpluloj
la veron tordi kiun diris vi
vivcelojn povas vidi vi rompitaj,
kaj per uzitaj iloj fari pli:
se povas vi en unu hazardludo
de vi jam akiritan riski ĉion,
kaj perdi, kaj denove ekkomenci,
kaj pri la perdo ne eldiri ion;
se povas vi muskolon, nervon, koron,
jam eluzitajn, igi servi vin,
kaj tiel daŭrigadi la laboron
havante nur la Volon fari ĝin:
se povas vi babili ĉie - virta,
kun reĝoj promenadi - ne fiere,
se povas vundi nek malam' nek amo,
se ĉiu al vi gravas sed modere;
se povas en minuto mallasema
sesdeksekundan vojon kuri vi,
via la Tero estas, kun enhavo,
kaj plu - vi estas Viro, fil' de mi!

Rudyard Kipling, el la angla tradukis L.A. kaj B.E. Long
(el "La Eklezia Revuo", marto aprilo 1918)

LAMENTO POR LA CIGANOJ

Ilia hejmo estis la senfinaj
ebenoj de Eŭrazio.
Ili tegmento la stelluma ĉielo
sub kiu ili dormis en triba ĉirkaŭbrako.
Kvazaŭ papilioj ili neniam povis kontenti
pri la gusto de unu floro
sed devis serĉi konstante
la lumon de ĉiam novaj ĝardenoj.
Ili ne volis rezigni la liberecon
vagi tra la kontinento
por la prezo de propra patrio.
Nomadi sen malhelpoj
de lando al lando
estis tiel valora por ili
kiel la vivo mem.
Ili parolis strangan lingvon
kiun la erudiciuloj konsideras la plej malnova
sed postlasis nenian skribon.
Ke ili kuraĝis esti tiel diferencaj disde la aliaj
restas ilia ĉefa testamento.
Tamen ilia amo al la muziko estis tiel senlima
kiel ilia amo al la libereco.
La vibrantaj kaj melankoliaj melodioj kiujn ili violonis
vagante de lando al lando
retrovis sin en la notlibroj
de famaj komponistoj.
Kvankam ilia tragika sorto malofte menciiĝas
en la analoj de la dummilita holokaŭsto
ili postlasis al ni
antaŭ ol konsumiĝi en krematoriaj fajroj
la unikan testamenton:
tiun de la popolo
kiu praktikis sen prediki
kion ĝi kredis -
ke popoloj ne devas esti dividitaj per bordlimoj.

Julius Balbin

MOVADE

❖ Mons. Patrick Coveney, laŭ irlanda deveno, estis nomumita Vic-Nuncio en Etiopio kun la rango de Ĉefepiskopo. Mons. Coveney, Dumviva Membro de IKUE, konas bonege la Internacian Lingvon.

Al li iru plej varmaj gratuloj kaj bondeziroj!

Mons. Otĉenaŝek

❖ Mons. Karei Otĉenaŝek, Episkopo de Hradec Kralovè (Ĉeĥoslovakio), tiel respondis, 26.02.1990, al la Landa Reprezentanto de IKUE Miloslav Ŝvàĉek, kiu petis lian patronecon super la IKUE-Sekcio:

" Rilate al mia patroneco, se ne malhelpos al vi la fakto, ke via "*patrono*" "*ne scipovas*" Esperanton, kaj ke lia kunlaboro povas baziĝi nur je tio, ke li vin kaj viajn proksimajn inkluzivos en sian benon, do volonte mi tion akceptas, sed mi de vi ankoraŭ petas unu ĉiutagan esperantan " Saluton Maria ", por elpeti helpon de la Sankta Spirito. Ĉu mi povas? ".

Cetere, ke Mons. Otĉenaŝek " ne scipovas " Esperanton, ne estas tute ĝuste, ĉar li plurfoje skribis en Esperanto (kvankam nur per malmultaj vortoj) al la Prezidanto de IKUE.

❖ Pri la denova agado de la katolikaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakio oni aparte informis Kard. Frantiŝek Tomaŝek, Ĉefepiskopon de Prago, kiu estas honora membro de IKUE kaj leganto de EK.

❖ Unu el la Episkopoj ĵus nomumitaj por Rumanio estas Esperantisto: temas pri Mons. György M. Jakubinyi, kiu estis nomumita Help-Episkopo de Alba Iulia.

Mons. Jakubinyi, hungardevena, naskiĝis en Sighetul - Marmatie 13.2.1946. Li estis ordinita Sacerdoto 13.4.1969; poste li studis en Romo (1970-74), akirante diplomon pri Teologio kaj Sankta Skribo. De 1974 li instruas bibliajn sciencojn kaj lingvojn ĉe la Seminario de Alba Iulia. En 1978 li doktoriĝis pri Teologio en la Teologia Akademio de Budapeŝto.

En la Seminario li gvidis kursojn pri Esperanto ĉiuduajare, ekde 1980, por volontuloj; ĝis nun li instruis Esperanton al ĉirkaŭ 30 Seminarianoj, el kiuj 18 jam estas Sacerdotoj.

Kompreneble, IKUE ĝojas pro la nomumo de Mons. Jakubinyi, kaj sentas sin honorata pri lia esperantisteco.

❖ "*Trans la silento*" estas la titolo de libreto pri Benedetta Bianchi Porro: biografiaj notoj, pensoj, leteroj kaj atestoj. La figuro de Benedetta laŭiras la evangelian vojon de la ĝojo por prilumi la mondon de suferado.

Kial traduko al Esperanto de verketo, kiu jam ekzistas en pluraj lingvoj? Ĉar, malgraŭ la tradukoj, la lingvoj estas multegaj, kaj starigas barojn; pere de esperanto la mesaĝo de Benedetta atingis, kiel fermento kaj primico, malproksimajn landojn. Kelkfoje, tradukoj estis faritaj ne el la itala originalo, sed el la Esperanta versio, kiu tiel rolis kiel ponto.

La volumeto estas ricevebla kontraŭ 10.000 italaj liroj ĉe: *Amici di Benedetta, via Pedriali 18, I-47100 Forli FO, Italio, poŝta konto 14097471*. Oni povas ankaŭ aranĝi per la celebrigo de unu S. Meso laŭ la intenco de *P. Duilio Magnani (viale C. Zavagli 73, I-47037 Rimini FO, Italio)*, al kiu oni sendu la kvitancon de la Sacerdoto kaj la mendon.

❖ La Centro de Dokumentado pri la Papeco de Johano Paŭlo la Dua *(Centro di Documentazione del Pontificato di Giovanni Paolo II, via Cassia 1200, I-00189 Roma, Italio)* eldonis belaspektan bibliografion titolitan "*Papo Johano Paŭlo II en esperantaj publikaĵoj*", kiu registras (rilate la periodon 1978-1986) eldirojn de la Papo aperintajn en esperantlingva traduko, kaj publikaĵojn pri la Papo aperintajn en Esperanto.

Prizorgis la 48-paĝan libreton S-ino Krystyna Macinska el Pollando; la antaŭparolon faris la Direktoro de la Centro, la pola Monsinjoro Michal Jagosz.

La bibliografio estas unua provo de registrado de publikaĵoj en Esperanto de kaj pri Johano Paŭlo la Dua; ĉiuj Esperantistoj estas varme petataj helpi je kompletigo, per informoj kaj presaĵoj.

❖ 13.12.1989, en la ĉeesto de la esperantista franciskano P. Carlo Cecchitelli, Gardanto de Sankta Lando (kun la rango de Episkopo), estis inaŭgurita panelo (kies foto aperas sur la kovrilpaĝo de ĉi tiu numero) kun la teksto en Esperanto de la preĝo "*Benedictus*" (Benata). La panelo troviĝas en la Klostro de la Monaĥelojo de la Franciskanaj Patroj en Ain Karim (Sankta Lando), la urbo kie loĝis Elizabeta, kuzino de Maria, kaj do la loko kie okazis la Vizito de Maria al Elizabeta.

Kiel jam skribite en EK 9/1989, la koncerna propono estis lanĉita de P. Cecchitelli, kaj entuziasme akceptita de UECI (la itala sekcio de IKUE), kiu kolektis preskaŭ 80% el la bezonata mono (ĉirkaŭ 2.000 usonaj dolaroj); IKUE pagis la reston el sia propra kaso. Estus tre bele, tamen, se la unuopaj IKUE-anoj sendus mondonacojn aŭ mesintencojn, por ke la panelo estu vere *komuna donaco* de la katolikaj Esperantistoj, ne nun italaj.

❖ Okaze de la 82-a Franca Kongreso de Esperanto en Blois (1-5.6.1990), P.Louis Bourdon celebros S. Meson en Esperanto 3.6.1990 je la 18-a. Informas: *S-ro R. Pons, 24 mail Pierre Charlot, F-41000 Blois, Francio.*

❖ UECI, la Itala Sekcio de IKUE, kongresos en la centritala urbo Foligno (proksime de Asizo), de la 7-a ĝis la 11-a de septembro 1990. Informas: *UECI, viale C. Zavagli 73, I-47037 Rimini FO, Italio* (tel. 39-541-26447); *S-ro Carlo Sarandrea* (tel. 39-6-5414415); *S-ro Mauro Ortelli* (tel. 39-546-662714). Oni telefonu vespere ĉirkaŭ la 21-a horo.

❖ HEROLDO DE ESPERANTO, la plej ofta kaj populara internacia gazeto en Esperanto, estas de 70 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo. 16 numeroj jare, ilustritaj raportoj el la tuta mondo, diversaj rubrikoj, kalendaro, duobla Kongresa numero ktp. *Baza jarabono 19 us. dol.* Mendu provekzempleron ĉe la redakcio: *A. Fighiera-Sikorska, Via N. Sandre 15, I-10078 Venaria R. (Torino), Italio.*

RADIO VATIKANA EN ESPERANTO

La adjektivo "*katolika*" signifas "*universala*", kaj ĝi esprimas la vokiĝon de Kristanismo por la tuta homaro. Dum nia jarcento la kristanoj pliintensigis sian universalisman elanon por la komunikado kaj la kunlaboro kun ĉiu homo, ankaŭ kun tiu nekatolika aŭ eĉ nekristana. En tiu ĉi situacio, la Esperanto-programo estas "*hejmeca*" ĉe Radio Vatikana, kaj ĝi aparte emfazas la ekumenajn kaj sociajn temarojn.



Unu el la sendoturoj de Radio Vatikana

Radio Vatikana elsendas en Esperanto:

dimanĉe,
horo 21-a (laŭ la itala horo):

kurtaj ondoj:
6190, 6248, 7250, 9645 kHz
por Eŭropo;

17730, 21650 kHz
pro Afriko;

mezaj ondoj:
1530 kHz

frekvenca modulado (por Romo):
526 kHz; 93.3, 96.3, 105 mHz

ĵaŭde,
horo 7-a (laŭ itala horo):

kurtaj ondoj:
6248, 7250, 9755, 11715 kHz
por Eŭropo;

mezaj ondoj:
1611 kHz

frekvenca modulado (por Romo):
103.8 mHz

Nur korespondaĵoj pruvas, ke la radio-elsendoj estas aŭskultataj. Pro tio, bonvolu skribi almenaŭ unufoje en la jaro al: *Radio Vatikana, Esperanto, Piazza Pia 3, I-00120 Roma, Italio.*

La kostoj de la Esperanto-elsendoj de Radio Vatikana estas pagataj grandparte de IKUE. Se vi ŝatas la programojn kaj deziras ilian daŭrigon, bonvolu memori, ke IKUE dankeme akceptas donacojn.

Por sendi monon al IKUE oni bonvolu uzi unu el ĉi tiuj rimedoj:

1) pere de niaj Landaj Reprezentantoj (kies adresoj kutime aperas en la lasta paĝo de ĉi tiu revuo);

2) per la itala poŝta konto 23290000, laŭ la adreso: Centra Oficejo de IKUE, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (la pago devas esti esprimata en italaj liroj!); el multaj landoj estas eble sendi monon al tiu poŝta konto, sen komplikaĵoj;

3) per internacia poŝta mandato, laŭ la adreso: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (ankaŭ en ĉi tiu kazo, la pago devas esti esprimata en italaj liroj);

4) per itala banka ĉeko, aŭ per internacia banka ĉeko pagebla en Italio; la nomo estu: Antonio De Salvo, via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio (se la ĉeko estas je nomo de IKUE, ĝi estas praktike ne enkasigebla); la pago povas esti esprimata en iu ajn komercebla valuto; por ĉiu internacia ĉeko, oni aldonu 5.000 italajn lirojn aŭ egalvaloron pro bankaj kostoj;

5) per bankaj biletoj, en iu ajn komercebla valuto;

6) per la konto de IKUE ĉe U.E.A. (kodo: Ikue-v).

ENHAVO

KRISTANE

71 Mi vokas vin, ho Eternulo, kaj vi aŭskultas min!
(Th. Rotthaus)

73 Iom pri " Saluton Maria "
(A.L.L. dos Santos)

75 Intervjuo al ĉina pastro
(Peterson)

78 Dudek jarcentoj de kristanismo

80 Religioj en Litovio
(A. Marszalkowski)

80 Pax vobis!
(W. Mudrak)

HUMANE

81 Se
(R. Kipling)

82 Lamento por la Ciganoj
(J. Balbin)

MOVADE

83 Informoj

86 Radio Vatikana

Landaj reprezentantoj de IKUE

Oni pagu la abonkotizon al la landaj reprezentantoj, samtempe avertante pri tio la Centran Oficejon (por ke tuj estu en ordo la ekspedo de la revuo). La jara kotizo de membroabonanto estas 30 svisaj frankoj aŭ egalvaloro. Pro la daŭra ŝanĝiĝo de la kurzoj de valutoj, la sube indikitaj valoroj havas nur informan celon.

Argentino
Daniel A. Cotarelo Garcìa
c.c. 92 Suc. 3
RA-1403 Buenos Aires

Aŭstrio
Walter Mudrak
Beatrixgasse 19/9
A-1030 Wien III
ŝil. 250

Belgio
Raymond Lecat
av. Géneral Eisenhower 123
B-1030 Bruxelles/ Brussel
b. fr. 800

Brazilo
Euclides Carneíro Da Silva
rua Capit. Paulino Freire 366
BR-08-700 Mogi das Cruzes/SP

Britio
Roderic Mc Dermott
5 Clapgate Rd.
WD2 SNF Bushey/ Herts
br. p. 11

Ĉeĥoslovakio
Miloslav Ŝváĉek
Trŝická 6
CS-751 27 Penĉice

Francio
P. Roger Degrelle
12, rue Estienne d'Orves
F-54490 Piennes
fr. fr. 130

F. R. Germanio
Jòzsef Kondor
Alte Schloss-Str. 25
D-5450 Neuwied 21 - Engers
p.k. 113726-673
Ludwigshafen Rhein;
g. m. 35

Hispanio
P. Manuel Casanoves, CMF
Roger de Llúria 5
E-08010 Barcelona
pes. 2.200

Hungario
P. Lajos Kòbor
H-9484 Pereszteg

Italio
UECI
viale C. Zavagli 73
I-47037 Rimini FO
p.k. 11129475; lit. 27.000

Japanio
Hatiro Matubara
Namimatu-tyo 4/5
596 Kisiwada-si, Oosaka-hu
enoj 2.700

Jugoslavio
P. Prof. Franjo Gruiĉ
Strossmayerov trg 5
YU-54400 Djakovo

Kanado
Kevin Doyle
1814 Sawmill Creek Cres.
Gloucester, Ont., K1T 2E6
kan. dol. 25

Kolombio
Jorge Velàsquez G.
calle 54 no 56-12, apart. 201
Medellín

Madagaskaro
Roger Randrianekena
B. P. 14
Ambatondrazaka

Meksikio
P. José M. Claramunt
apartado postal 318
MEX-68000 Oaxaca, Oax

Nederlando
S. P. Smits
Dunantstraat 164
NL-2713 VC Zoetermeer
p. k. 685124; gld 42

Norvegio
Stefan Murak
Semsvn 166
N-1370 Asker

Novzelando
G. D. Raynor
49 Sunny Grove
Wainuiomata, Wgtn

Pollando
Franciszka Bardecka
Litewska 24/2
PL-30.014 Krakòw
zl. 9.000

Portugalio
Portug. Esper. Asocio
rua Dr J. Couto 6 r/c A
P-1500 Lisboa 4
esk. 2.000

Sovetunio
P. Valerijus Rudzinskas
SU-234567 Lazdiu
raj. Rudimina, Litovio

Svislando
P. Francisko Bommer
Communauté Marianiste
rue du Collège 5
CH-1920 Martigny

Tajlando
P. Marcel Perray
G.P.O. Box 1846
Bangkok 10501

Tajvano/ Formozo (Ĉinio)
P. Ĉi-Ŝin Chouw Roch
St. Nicolas Church, Pinglin
2320 Taipei Hsien, Taiwan

Togo
M. Agbolo Messar
B.P. 13169
Lomé

Usono
P. Kevin Laughery
245 Norh Amos ave.
Springfield
IL-62702-4793
us. dol. 22 - aerpoŝte 30

Zairio
Nsimba Mfumu Ndongala
B. P. 1323
Kinshasa 1

BIBLIOTEKA IKUE